

PRI SISTEMO

Radoslaw Nowakowski

Iu el miaj konatuloj, programisto, ano de la nacio ege amanta ordon kaj sistemecon konfidis al mi, ke ĉiufoje rilatante kun arto kaj artistoj li sentis sin kvazau devigita puŝiri tra landoj nekonataj kaj malfavoraj al li. Tamen, io estis lin alloganta, io al kiu li ne povis kontraustari, kio estis senvoliganta lian precizan kaj logikecan menson. Frustrado estis pligrandiganta, li do decidis senproblemiĝi por ĉiam. Li aĉetis pianon kaj komencis regule frekventi lecionojn - tio ne estis facila pro multaj devigoj familiaj, hejmaj kaj profesiaj. Jam komence li trovis, ke l'afero vere ne estas malfacila kaj komplika. Sufiĉas ekkoni la SISTEMON ordiganta teruran kaoson de sonoj kaj oni senpene konkeros imperion de l'arto. Tamen baldau montriĝis, ke la sistemo ne ekzistas, tio signifas: sistemoj treege multas, eble eĉ senfine kaj oni ja scias, ke senfino egalas nulo. Ho! Oni eĉ ne eblas praktiki regule kaj sisteme. Nigra nubo de malespero kovris klaran logikan menson. Kion fari? Tiam mia konatulo demandis min kruele kaj ruze: "Kaj kia estas via sistemo?" Kaj mi respondis kruele ĝisfunde: "Mi ne scias". -

Mi povus prezenti al li ekzemple anatomion de ritmo: jen trioletoj, tie deksekonotoj, nun rulado, kvar taktoj *ad libitum* Sed tio estus almenaŭ aritmetiko kiun oni ne povas nomi muziko. Mi montrus al li nur la briketojn, sed uzante brikojn oni kapablas konstrui monarĥan malliberejon au dolĉegan palacon, do tia analizo ne klarigus kial mi ludis tiele en tiu momento. Oni devus kolekti kaj esplori ĉiujn sonojn kiujn mi iam audis kaj kiujn mi ne audis, sed mi dubas ĉu tio sufiĉus

Internacia Scienca Asocio Esperantista

(tamen mi tiom pligrandigus kvanton da informoj, ke proksimigus ĝin al la bariero entropia - analogio ne plene sukcesa, ĉar tiukaze kvanto da informoj estus nur proksima al infinito, do ne infinita - kiam la termodinamiko malekvilibra klare asertas, ke temas pri infinita kvanto da informoj).

Mi menciis nenion pri komao pitagora kaj oktavo dividita far Safi ad Din je deksep partoj, kion ni tute ne kapablas pridiskuti ĉe la klavaro de ordinara piano. Mi kaŝis ankau la fakton ke Pigmeinoj jodlas alimaniere ol Tiroloj, ĉar de supre malsupren, ne de malsupre supren, kvankam ne tia estis la kialo de ŝajna diverseco de tiuj du kulturoj.

Mi ankau ne diris al li, ke kiam alvenas la momento kaj li ekdeziros ludi sian muzikon, do KREI ION, li devus tiumomente FORGESI ĈION kion li eksciis, ekkonis kaj lernis - kaj ju pli multe da balasto li jetos for des pli alte leviĝos la balono en kiu li vojaĝas.

Kien leviĝos kaj flugos?

Ha!

Radoslaw Nowakowski
Dabrowa Dolna 41
PL 26-010 Bodzentin
Pollando

Pri R. Nowakowski eksciigias jeno:
studis arkitekturon kaj ludas improvizitan muzikon,
admiras hieroglifojn pli ol alfabetojn ne-emante ties linearecon, kiu ŝajnas maladekvate al la space pulsanta realeco,
setlas en "unu-ĉevalo-vilaĝo" vivante enmeze de libroj en domo kies fruktoĝardeno eble ŝanĝiĝos iutage mem en libron -